



5(133)  
2012

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW



ARANĜO SUB LA HONORA PROTEKTO DE PREZIDENTO  
DE LA URBO KRAKÓW – JACEK MAJCHROWSKI  
La aranĝon subtenas finance Urba Komunumo



krakow.pl

## XXVII-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo (1 – 3.06.2012) Programo

### Vendredo, 1.06

Kulturdomo „Podgórze”, str. Sokolska 13

- 09:00 Akceptado de partoprenantoj kaj disdonado de materialoj.  
10:00 – 10:30 Inaŭguro.  
10:30 – 11:30 Andrzej Kołpanowicz. Krakovo en la jaro 1912.  
11:30 – 12:00 Zbigniew Duda. Naturo de la Krakova Tero.  
12:00 – 12:30 Magdalena Tatar. Salminejo en Wieliczka.  
12:30 – 13:30 Edward Malewicz. Pri kelkaj popularaj nezamenhofaĵoj en la nuntempa Esperanto.  
15:00 – 15:30 Renkonto en fojero de Malnova Teatro, loko de la inaŭguro de VIII-a UK-o en 1912 j. Grażyna Porada. Pri programo de la VIII UK-o.  
15:30 – 17:00 Promeno tra centro de Krakovo.

Kulturdomo „Podgórze”, str. Sokolska 13

- 17:00 – 18:00 Nesklavigita aŭtuno. Idalia kaj Bonfilo. Plenumo de poemo de Lidia Żukowska kun la gitara akompano. Esperanta traduko: Lidia Ligeża. Elpaŝas: Lidia Ligeża, Kazimierz Leja, Andrzej Kołpanowicz, Joachim Kołpanowicz.  
18:15 – 19:00 La muzikkoncerto: Julia Kołpanowicz – violono, Joachim Kołpanowicz – piano.

### Sabato, 2.06

Kulturdomo „Podgórze”, str. Sokolska 13

- 09:00 – 09:30 Wanda Jakubaszek. La edukaj problemoj de postmodernisma kulturo.  
09:30 – 10:00 Andrzej Feuer. Mnemoteknikaj versaĵetoj.  
10:00 – 11:30 Magdalena Tatar, Jolanta Kieres. Etlecionoj de Esperanto por diversaĝaj grupoj.  
11:30 – 12:00 Włodzimierz Opoka. Esperanto kaj elstaraj medicinistoj.  
12:00 – 13:00 Marta Michałowska. Esperanto kaj religioj.  
13:00 – 13:45 Marlon C. Ribeiro. Mirindaĵoj de Brazilio.  
15:00 – 16:00 Stanisław Mandrak. „Amikeca servo”. Pri Esperanto en polico.  
16:15 – 17:00 Lidia Ligeża. La aŭtora renkonto.  
17:15 – 18:30 Irena Urbańska, Jacek Bylica (akompano). Post Nemanio foren... Kantoj el limtereno.  
19:00 – 20:00 Esperanta S-ta Meso. Preĝejo al s-ta Jozefo (Rynek Podgórski)

### Dimanĉo, 3.06

Aulo de I Liceo al B. Nowodworski, eiro de Pl. Na Groblach 9

#### Scienca seminario "Esperanto stosowane"

- 10:15 – 10:30 Dir. mag. Tomasz Malicki. Bonvenaj informoj pri agado de la I Liceo al B. Nowodworski.  
10:30 – 11:30 prof. dr Walter Żelazny (Warszawa). La memnieniigo de Esperantujo.  
11:30 – 12:00 dr Bronisław Kieres (Kraków). Koncizaj informoj pri historia kaj nuntempa pola jura sistemo.  
12:00 – 12:30 dr Adam Łomnicki. Matematikaj taskoj por konkludi.  
12:30 – 13:00 doc. dr Jerzy Żabowski (Płock). Strategiaj ludoj.  
13:00 – 14:00 prof. dr Ilona Koutny (Poznań). Ĉu Esperanto estas eŭropa lingvo.  
14:00 – 14:45 Lidia Ligeża (Kraków). Printempaj kaj someraj polaj kutimoj.

Al XVII-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo akompanas ekspozicio preparita de Pola Sekcio de ILEI st. „Esperanto i jego twórca w 125 rocznicę powstania języka”

Vendrede kaj sabate libroservo rekomendas malmultekostajn, interesajn E-eldonaĵojn.

## Krakova Societo ESPERANTO

### La programo de la renkontoj maje 2012 j.

10. 05. – Vizito en Historia Muzeo de Krakovo pro ekspozicio de desegnaĵoj de Bronisław Schonborn - artisto kaj esperantisto.
17. 05. – Lidia Ligęza kaj Grażyna Porada. **Raporto pri restado en Albanio**
24. 05. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
31. 05. – La organiza renkonto antaŭ XXVII Esperantaj Tagoj de Krakovo
1. - 3.06. – XXVII Esperantaj Tagoj de Krakovo laŭ la aparta programo
14. 06. – La organiza renkonto post XXVII Esperantaj Tagoj de Krakovo
21. 06. – Lidia Ligęza. **La plej oftaj esperantaj eraroj de slavoj**
28. 06. – La societa renkonto; la adiaŭo antaŭ libertempo

### La familiaj aferoj

Mia jena frazeologia babilado rilatas al familiaj aferoj kaj disvolviĝos kronologie. – Ni devas komenci de du personoj, kiuj aŭ fondos aŭ ne fondos la familion. Ne faros tion *ĝisosta fraŭlo* aŭ *ŝtoniĝinta fraŭlo*, kiu post jaroj fariĝos *olda fraŭlo*. *Senedzulino* povas *fraŭline maljuniĝi* aŭ fariĝi *konkubino*. Feliĉe ŝi ne devos en certaj landoj pagi imposton sur la fraŭloj, kion devas fari viroj. Ne tro elegantan diraĵon *olda fraŭlino* anstataŭis feliĉe diraĵo *fraŭlino laŭ la propra elekto*.

Tamen ni povas decidi alimaniere, kaj se ni ne havas okazon ekkoni la ĝustan ulon aŭ ulinon, ni utiligas *svatiganton* aŭ *svatagentejon*, fakulojn por *svati*. Plej bone scipovas *svati svatigantinoj* – ekz. kiel en dramo de Gogol **Edzigo**, aŭ en ĉarma filmo **La violonisto sur tegmento**. Estas multaj aventuroj dum tiu ĉi tempo-periodo de la homa vivo. „Se vi volas filinon, flatu la patrinon” saĝe diras francoj, kaj ne nur. Averton „Rigardu la patrinon antaŭ ol svatiĝi pri la filino” ni alte taksas post ia tempo. „Fianciĝo ne estas edziĝo” – kaj bone.

Gepatroj ambaŭflanke ankaŭ esperas ion kaj agas. La patrino *atendas bonan partion por sia filino* kaj cerbumas ĉu *doni al li sian filinon kiel edzinon*. La prudenta patro *deziras edzigi sian filon al riĉa fraŭlino* kaj pensas pri alteco de la *doto*. Se paro de gejunuloj ne estas *apartigita de tro granda diferenco de situacioj* la junulo post *peto pri la mano* de ŝi povas jam *edziĝi* do fariĝi *edzo*. Fraŭlino *edziniĝas*, t.e. fariĝas *edzino*. Se gepatroj ne konsentas – gejunuloj aŭ rezignas de la plano esti kune aŭ edziĝas kaj edziniĝas *kontraŭ volo de gepatroj*. Ili povas *geedziĝi sekrete*, ne pensante pri *mezalianco* aŭ *misedziĝo* pro malalta pozicio, deveno aŭ ekonomia stato. *Edziĝo* povas ekesti *pro* aŭ *el inklino, amo, mono, intereso* ankaŭ *laŭ koro*. Pli bone, se edziniĝas *edziĝopova* aŭ *edziĝinmatura* knabino – post aŭ sen *provedziĝo*. En ĉiu kazo *edziĝo estas loterio*.

Post *deklaro pri edziĝo* povas okazi *edziĝo civila, konfesia* aŭ *interkonfesia*. Ĉiukaze bezonata estas *formulo* kaj *ringo*. Oni redaktas *oficialan akton de edziĝo*. Pri *ceremonio* oni povas publikigi *edziĝanonson* aŭ ne fari tion. *Edziĝa soleno* ankaŭ nomiĝas *nupto*. La gastoj povas iri en *edziĝifesta procesio*, aŭ tion eviti.

*Novedzino donas sin al li* kiel lia legala virino. *Novedzo prenas la virgan kronon* aŭ *defloras* ŝin, se tio ankoraŭ estas aktuala. Ofte sekvas la *edziĝvojaĝo*, kiu daŭras tutan *mielmonaton* aŭ pli kurtan *mielan tempon*. Ligita por la viro edzeco almenaŭ dum la miela tempo estas feliĉa. Ekzistas stranguloj, nune ne multaj, kiuj ligas *blankan edziĝon*, kiu rilatas tablon, sed ne liton. *Edzo* povas esti *vera perlo* por sia *edzino*, sed nur tiam, kiam *li sentas por ŝi veran kulton*. Pli facile estas senti la kulton por *virta, senriproĉa edzino*.

Fino de fabeloj diras, ke „*ili geedziĝis* kaj kunvivis *feliĉaj por ĉiam*” t.e. ĝis *Ora Edziĝo*, kiu venas post 50 jaroj. Oni ankaŭ nomas ĝin *La Nupta Jubileo*. Oni ne devas tiom longe kunvivi

por soleni jubileojn. Kaj tiel – la jubileo post unu jaro de la edziĝo nomiĝas „*la kotona*”, post du jaroj „*la papera*”, post tri jaroj „*la leda*”, post kvar „*la flora*”, post kvin „*la ligna*”, post sep „*la lana*”, post dek „*la stana*”, post dekdu jaroj de la edziĝa feliĉo – „*la silka*”, post dekkvin jaroj – „*la kristala*”, post dudek – „*la porcelana*”, post dudek kvin jaroj – „*la arĝenta*”, post tridek – „*la perla*”, post tridek kvin „*la korala*”, post kvardek „*la rubena*”, post kvardekkvin „*la safira*”, post kvindek – „*la ora*”. Nemultaj havas okazon soleni jubileojn – post 60 jaroj – „*la diamantan*”, kaj post 75 jaroj – „*la brilantan*”.

La gegdziĝa vivo, memkompreneble ne konsistas nur el jubileoj. Ĝi abundas antaŭ ĉio en okazintaĵoj el tiel nomata vera vivo. Oni diras: „Rapida edziĝo – porĉiama kateniĝo”. Edzino povas esti tro *postulema*, povas *fari scenoj kun akraj riproĉoj* kontraŭ la edzo, povas *konduki lin je la nazo aŭ teni sub ŝuo*. Hejme la virino ŝatas *sinjori, mastri* kaj *mastrumi*. La edzo *submetiĝas al la kapriĉoj* de la edzino aŭ ne. Povas ankaŭ veni en kapon de la edzo *penso esti ĵaluza*; li ankaŭ povas fariĝi *ĵaluza kiel tigro*. Li tiam proponas: „Ĵuru al mi per Dio, ke vi ne agas malfidele”. „Pri nenio oni povas ĵuri” – respondas enigme la edzino. – *Furiozas la ĵaluzo* de la edzo. *Ĵaluzulo* ne volas, ke oni ludu amon kun lia edzino. Ŝi povas esti ne sufiĉe bona aktorino, por konvinki la edzon pri sia fideleco.

En rilatoj de la paro gravas *potento de la edzo* kaj lia *potenco*, precipe tro montrata. Stato de virino estas tiam plorinda kaj bedaŭrinda. Tamen oni diras: „Kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola”.

Spite al ordalo „Ne deziru la edzinon de via proksimulo” viroj volonte delogas ies edzinon, serĉas plezuron ĉe fremda virino kaj cerbumas, kiel enbrakigi aŭ enbrakumi virinon ne apartenantan al ili. Ĉu tio estas la konduto de honesta edzo? *Eksterleĝecaj amrilatoj* kaŭzas interesajn efikojn. Oni povas iun *kokri, kreskigi kornojn al iu ...* Oni *perfidas la edzinon, adultas* kaj eĉ povas esti *kaptitaj en adulto*. *Kokrita edzo* en Italio, kaj ne nur, nomiĝas *kornulo*... En patologiaj familioj eblas *incesto* aŭ *sangadulto* – amrilato kun ano de la familio ...

Se ambaŭ flankoj deziras jam *liberigi de partnero, kiu ilin malhonoras*, povas jam sekvi *divorco*. *Eksedziĝo* kaj *eksedziniĝo kun iu, je iu* aŭ *disde iu* postulas procezon pro eksedziĝo aŭ divorco. La katolika eklezio ne agnoskas divorcon, sed oni povas almenaŭ gajni *separon*. Eblas *eksedziĝaj* aŭ *eksedziniĝaj alimentoj*, kiuj estas la plej altaj en Usono, ne nur en kazo de stelulinoj kaj steluloj. Speco de la divorco estas *repudio*, aplikata ekzemple ĉe ortodoksaj judoj. *Repudii* la edzinon signifas rezigni de ŝi per unuflanka enmanigo al ŝi la divorcan leteron.

La sorto mem povas liberigi homon de la partnero aŭ partnerino. Kiam la edzino jam ne vivas la viro estas *vidvo*; virino en la simila situacio estas *vidvino*. Se la edzo forveturis por la longa tempo aŭ forkuris, oni diras pri la *pajla vidvino*. Krom soleco la vidvinon povas turmenti la ekonomia mizero, kio estis pli evidenta en tempoj, kiam vidvinoj ne estis sendependaj. Tial en Biblio kaj diversaj moralaj ordonoj ekzistas multaj avertoj: „Vidvinon kaj orfon ne premu”.

Pri poligamiaj aferoj, haremoj ktp. – ni ĉi-foje ne okupiĝos. Sufiĉan problemaron liveras malordigita vivo de niaj samkulturanoj. *Amaferoj* kaj *amaĵoj* de certaj geromantikuloj generis du eminentajn esperantajn terminojn – *kromedzino* kaj *kromedzo*. Funkcias ankaŭ la parolturno „*la kongresa edzo (edzino)*” substrekanta efemeran, nur porkongresan karakteron de la amrilato.

Antaŭ ol venas multdirektaj geedzaj problemoj en familio aperas infano, kiu povas naskiĝi nature aŭ per *cezara operacio*. Pli febla ĝi devas restadi en inkubatoro, kio okazas al *frunaskitoj*. Feliĉa *akuŝo* abundas je portemaj diraĵoj: Benita estu la frukto de via ventro. Felĉa la ventro, kiu vin naskis. Li estis naskita sub favora astro. Benata lando, kiu vidis lin naskiĝi. Ne ĉiuj tamen estas kontentaj pro la propra aŭ malpropra *naskiĝo*: Li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. Naskita sub malbona stelo. Pli bone estus al li ne veni en la mondon. Ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon. Kia patro, tia filo.

En la plej fua tempo-periodo de sia ekzisto la *ĵusnaskito* estas *bebo* aŭ *suĉinfano*. Plej bone

nutri ĝin nature, per la patrino *mamo kun cico* (*mamnutri*), aŭ per *cicumo* sur la boteleto. *Suĉigi* la bebon povas aŭ la propra patrino, aŭ dungita nutristino. Rapide venas tempo, kiam oni devas *demamigi* infanon. Infano estas tiam *metita for de mammo*. Vartas infanon patrino, avino aŭ dungita *infanistino*. Ili dorlotas infanon, endormigas per kantado, lulas al dormo. En lulkantoj ofte ripetiĝas refreno baj, baj, lu aŭ baj, lu, lu ... Oni tiutempe jam ne uzas *lulilojn*, plej populara estas *bebĉareto*. Dum tuta procezo varti kaj eduki infanon oni devas havi aŭ montri *anĝelan paciencon*. Pli aĝaj ol beboj infanoj volonte *kroĉigas al la jupo de la patrino*, kio povas daŭri eĉ ĝis 40-a jaro de la vivo, se patrino tro cedas al infano. Tio minacas ĉefe al *solinfanoj*. En antikvaj kulturoj tre gravis rajto de *unuenuaskiteco*. *Unuenuaskito* heredis tronon, kronon, titolon, la plej grandan parton de riĉaĵoj.

Oni tre ofte substrekas ĝemelan similecon ĉe ĝemeloj.

Eksterleĝa, neleĝa, eksteredzeca filo estas *bastardo*. Nur reĝaj kaj grandsinjoraj bastardoj de la pasinteco fartis bone. Nun tiaj aferoj ne gravas. Sed estas situacioj, kiam oni serĉas patron per *esploro de sangogrupoj*. Oni povas *adopti* infanon kaj ligi *rilatojn inter adoptito* (adoptita filo aŭ filino) kaj *adoptinto*, tio estas *adoptaj gepatroj*. *Sengepatra infano* estas *orfo*. Por bono kaj sano de infanoj oni projektas specialan bebestaron, bebtukoj, vindilojn, pampersoĵojn. Oni vartas kaj gardas infanojn en *vartejoj*, *gardejoj* aŭ *infanĝardenoj*.

Diraĵoj pri infanoj kaj gepatroj tekstas ne ĉiam optimisme. Jen kelkaj el ili: „Kia patro, tia filo”, „En infano vidiĝas, kia homo fariĝas”, „Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj – doloron”, „Por patrino ne ekzistas infano malbela”, „Esti por iu kiel patrino”, „Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj por unu patrino”, „Bato de patrino ne longe doloras”.

La sentema patrino *zorgas* pri la infano, *karesas* ĝin kaj *indulgas* al ĝi. Ŝi povas esti *sol-patrino*, t.e. patrino de solinfano aŭ *multinfanulino*. Patro rajtas patre admoni filon. Senindulga, severa patro ne ĉiam meritas filan amon kaj respekton. Filo povas esti simila al la patro per la karaktero aŭ eĉ esti la portreto, la vivanta bildo de sia patro. Filo ne ĉiam memoras pri filaj devoj – sen kiuj en pasinteco ne eblis patra amo kaj beno. „Kiu ŝparas sian vergon, tiu malamas sian filon”. La fama biblia filo (Luko, XV) nomata de Zamenhof la *erarinta* aŭ *perdita*, la plej adekvate estas la *disipa filo*, t.e. tiu, kiu malŝparas kaj neniigas havaĵon de la patro.

*Bofilo* kaj *bofilino* estas personoj, kiuj pro la nupto ekis anoj de la familio. *Baptofilo* kaj *baptofilino* estas niaj infanoj, en kies bapto ni partoprenis kiel gepatroj.

Familianoj estas niaj parencoj kaj *samsanguloj*. *Agnato* estas parenco en la vira linio, *kognato* – familiano el la virina devenlinio. Ni havas diversajn parencojn – *patrinflankaj* kaj *patroflankaj*, avojn kaj avinojn, onklojn, onklojn, praavojn, kuzojn je la diversaj gradoj, nepojn kaj nevojn. Ĉi-momente ni kutime ne diferencas geonklojn – parencojn de la patro de parencoj de la patrino. Se oni devas tion fari, oni povas diri: *onklo sur la patra flanko*.

Bazajn nomojn de niaj familianoj ni rajtas uzi karesforme, do ne nur patro, patrino, avo, avino, onklo, onklo sed ankaŭ paĉjo, patreto, panjo, patrineto, ovĉjo, avinjo, avineto, oĉjo, onklo, onklo ktp.

Ekzistas multaj diraĵoj kaj avertoj montrantaj funkciadon de la familio ekde komenco de la civilizo. Patroj avaras, filoj malŝparas. Kion la patro faras estas ĉiam ĝusta. Aŭskultu infanoj la instruon de la patro. Patro nia, kiu estas en la ĉielo ... Adamo donis al sia edzino la nomon Eva, ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj. Lia pli aĝa frato estis por li kiel patrino. Se filino de pastro senhonorigis per malĉastado oni forbruligu ŝin. Dio indulgema kaj kompatema, kiu punas la kulpon de patroj sur filoj kaj nepoj.

La seninterrompa ĉeno de generacioj – *antaŭuloj*, *samgeneracioj* kaj *posteuloj* formas interesan *genealogian arbon* ampleksantan diversajn multajn aŭ malpli multajn *branĉojn de la familio*.